


La 14an de decembro-2008, la du asturaj E-grupoj kiuj kutime kunfestas la ĉiujaran Zamenhofan tagon, t.e. **ANTAŬEN**, de Avilés, kaj **Astura Esperanto Asocio**, de Gijón, kunvenis, ĉi foje en nia urbo, por partopreni tiun fratecan renkontiĝon.
Ĉi jare la partoprenantoj malmulte nombris kompare al antaŭaj tiutipaj okazoj. La kialo estis tio ke la tiutempa vetero estis tre malfavora. Estis pluvego, malvarmo, hajlo… Ne eblis stari surstrate en la strato Esperanto, loko de la renkontiĝo. La ĉeestantaro devis atendi en kafo-drinkejo la fiksitan horon por la bankedo.
La ĉeestantaj membroj de ambaŭ E-grupoj pritaksis la eblecon ke tiu-ĉi festo, en la sekvajn jarojn, okazu, ne vintre, kiel ĝis nun, sed en alia epoko de la jaro, kiam la vetero estus malpli akra.
La bankedo okazis, unuafoje, en Restoracio **Parrilla Muñó**, kiu troviĝas proksime al la strato Esperanto. En la bankedo regis, kiel kutime, la bona kaj afabla etoso ekzistanta en ĉiuj festaj renkontiĝoj de la geesperantistoj.







# Jara Asembleo de Astura Esperanto Asocio

La Ĝenerala Asembleo de **Astura Esperanto Asocio** de la nuna jaro okazis la 27an de marto.
Oni pritraktis en ĝi la kutimajn aferojn de tiutipaj asembleoj. Ĉi-jare la Asembleo estis nur Ordinara, laŭ la statutara terminaro, t.e. ne okazis en ĝi (re)elektado de la estraro. Laŭstatute tio devas okazi ĉiun kvaran jaron, do, oni devos fari tiun elektadon venontjare.
Cetere, oni plenumis la kutimajn taskojn de la asembleo: konto-kontrolo, analizado de la agado de la Asocio dum la pasinta jaro, pristudo de la farenda laboro por la nuna jaro…
Rilate al ĉi lasta punkto, oni speciale atentis pri la farenda pro-pagando por altiri gelernantojn por niaj Esperanto-kursoj. Ankaŭ, oni prikonsideris la konvenon festi iamaniere la Centjaron de nia Esperantista Asocio, okazanta en la nuna jaro 2009. La graveco de la festado estos kongrua kun nia forto kaj kapablo, kiuj ne estas grandaj. Sed oni akceptis iun konkretan proponon: ke la sekva numero de la revuo **Heleco**, estu speciale dediĉata al la jarcenta historio de la esperantista movado en nia urbo konkrete kaj en la Asturia regiono ĝenerale.

